

Vážení přátelé,

v novém roce přejeme Vám zdraví, spokojenost, zdar, hojnost všeho dobrého, radostný a šťastný život.

V roce právě uplynulém předložili jsme Vám během roku na stranách našeho Věstníku desítky zpráv z esperantského světa. I když jsme zachytili pouze malou část tohoto dění ve prospěch mezinárodního jazyka, přece je to dostatečným svědectvím o stálém pokroku myšlenky esperanta ve světě. Rozmach esperantské literatury, krásné i vědecké, slavné rozhodnutí Uneska, jakož i to, že volání po zavedení esperanta ozývá se ve světě stále častěji, je důkazem, že naše základna je pevná.

Jednou z nejvýznamnějších zpráv minulého roku je, že esperanto žije v Sovětském svazu a je tam skutečností. Rovněž zprávy o obnově činnosti esperantistů v Bulharsku, Polsku a Maďarsku naplňují nás uspokojením. Esperanto pomáhá a pomůže ke skutečnému sblížení národů, umožní přechod k harmonickému soužití a vyšší vzdělanosti. Esperanto je nástrojem rozumu i srdce.

"Národové všech zemí projevují nesmírnou touhu překonat zeměpisné a ideologické hranice a obnovit mezinárodní styky... Tyto styky nutné pro všeobecný a tvůrčí rozvoj kultury pomohou zároveň odstraniti vzájemné nepochopení a nedůvěru." / Z resoluce Světové rady míru o kulturní výměně./

K vytvoření ovzduší přátelství, důvěry a míru pomáhá neutrální jazyk na předním místě. Naší povinností je, abychom přispěli ze všech sil k vítězství velké věci, abychom vytrvali v práci pro uskutečnění této myšlenky. V této práci nám pomáhá také mládež, která je na velkém stromě našeho hnutí slibným květem, který přinese požehnané ovoce.

Děkujeme Vám za Vaši podporu a věrnost a těšíme se, že ji zachováte i nadále. Prosíme o poukázání příspěvku na rok 1956 přiloženou platenkou. Nemůžeme pracovati bez Vaší finanční pomoci. Vaše pomoc je nejlepší investicí pro budování světa přátelství a míru. Roční příspěvek činí Kčs 14.-, pro rodinné příslušníky Kčs 6.- Kdo nemůže jinak, nechť poukáže aspoň Kčs 5.-, jako registrační příspěvek.

Doporučujeme Vám pravidelnou návštěvu našich schůzek. Zdokonalíte a prohloubíte své jazykové vědomosti, dovíte se mnoho užitečného, pobavíte se a prožijete příjemné chvíle v prostředí přátelském a v místnosti opravdu krásné. Připravujeme stále nové pořady s uměleckými večery, abychom dali průchod nadšení, tvůrčí práci, talentům a povzbudili k další činnosti. Prosíme též o přesnou docházku, abychom mohli začínati již krátce po 20. hodině.

J.V.

MONATA SPEGULO. La 6an de decembro okazis la tradicia Nikolaa vespero kun riĉa donac-disdonado. Multaj spritaj ŝercdonacoj, atestantaj pri inventemo de samideanoj, gajigis la intiman vesperon.

La 13an de dec. Solena artvespero honore al la naskiĝtago de Dr-o L.L.Zamenhof fariĝis denove „ora najlo“ de la aŭtuna-vintra duonjaro. Sub la plej kompetenta gvido de senlaca sinofera

programestro s-ano Prof. Vilibald Scheiber, profesoro de la Ŝtata Muzika Konservatorio en Brno, sukcesa komponisto, eminenta pianisto kaj opera muzikestro, ekbrilas niaj solenaj koncertvesperoj per ĉiam nova kaj freŝa belo kaj ravo. Prof. V. Scheiber prizorgas ne nur la pianajn sol-numerojn kaj ĉiujn akompanojn, sed li venigis, el inter siaj instruatoj la plej talentajn profesiajn gekantistojn al niaj programoj, zorgeme kaj pedante kun ili ekzercadas la ĉiam freŝtradukatajn Esperanto-tekstojn kaj plurajn kantistojn li jam gajnis por Esperanto.

Ankaŭ en ĉi tiu Koncertvespero rikoltis merititan aprezon kaj multajn aplaŭdojn sopranistino Jana Strádalová-Večeřová, kiun ni bone konis de la aprila Zamenhof-vespero kaj kies voĉo nin denove ĉarmis. Vera perlo estis ŝia prezento de Lulkanto de Greĉaninov. La operkantistino Božena Ministrová, mezosopran-aldo, debutis en nia rondo kun granda sukceso. La ŝategata ĉiama gasto de niaj koncertoj, Radislav Chudoba, kies sonorano brilan tenoron ni ĝojatendas aŭdi, eĉ en maldispono pro subita apenaŭ trapasita gripo sciis nin ravi. Ĉe la kvarmanaj pianseloj profesoron V. Scheiber akompanis sperta pianistino Anna Hanusová-Plachová. La riĉan unuarangan programon, en kiu alternis kantoj, arioj kaj duetoj de Weber, Mozart, Loewe, Ĉajkovskij, Dargomiŝkij, Greĉaninov, Raĥmaninov, Dvořák, Smetana, Bendl, Scheiber, Blodek, Wagner, Puccini, Saint Saëns, majstre kunmetis prof. Scheiber. Preskaŭ ĉiuj programeroj, kiel ĉe ĉiuj niaj solenvesperoj, estis unua-prezentoj kaj la tradukoj freŝe faritaj de plej bonaj verstradukantoj.

Domaĝe, ke tiun belegan koncerton, kies realigo kostis kelkiun oferon, venis aŭskulti relative malmultaj samideanoj. Konsiderante, ke en Brno vivas kelkaj centoj da esperantistoj, estas bedaŭrinda fakto, ke la neesperantistaj gastoj ĉe la artvespero devis plenigi la vakajn lokojn. Ĉu ne estas mirige, ke plejparto de samideanoj, por kiuj grupo da perfektaj profesiaj artistoj ofereme multajn dekojn da horoj ekzercas, tradukantoj centojn da horoj tradukas, la programestro multajn tagojn foroferas sian mongajnon, komitatanoj zorgas, eĉ ŝvite transportante anstataŭan pianon el fora koncertejo lastmomente por la difektita, por kiuj oni luas luksan salonon ne postulante plej etan enirpagon, dissendas brigade centojn da program-invitoj, por kiuj okazas multaj aliaj penoj kaj klopodoj - ke tiuj samideanoj restas inerte en siaj babuŝoj hejme aŭ preferas alian amuziĝon! Kiom da simile artisme altrangaj Zamenhofaj solenvesperoj, enkondukitaj per brila kaj profundsenta prologo de la klubestro, okazas en la mondo? Ĉu vi konscias, Brnanoj, kiom vi mem vin priŝtelis rerstante hejme?

La 20an de dec. okazis la prelego de nia klubprezidanto s-ano J. Vondroušek pri Adam Mickiewicz. En lingve majstra kaj aferkona prelego vere temelĉerpa, ni detale konatiĝis kun la vivo kaj verko de granda pole poeto. Prelegoj de nia klubestro laŭ sia stila eleganteco, lingva riĉeco, kie sparkas la voertrezoro de moderna Esperanto, stokoj de la Suplemento kaj Parnasa Gvidlibro, fariĝas modeloj por ni ceteraj.

La lastan mardon de la jaro, la 27an de dec. en sia prelego „La interesa kaj bela mondo“ disdonis al ni plastikan bildon pri

lando de enormaj riĉaĵoj, Brazilo, samideano Oldřich Kaláb. La perfekta junularano prezentis al ni ne nur temon streĉe interesan, sed ankaŭ prelegon lingve altnivelan kaj per sincera aplaŭdo rekompecitan.

Finante la jaran serion da 53 valoraj klubkunvenaj programoj, ni elkore dankas al ĉiuj aktivintoj. Por la venontaj 4 monatoj ni almete prezentas ree riĉan kaj varian programon. Ni alvokas ĉiujn lingvospertajn samideanojn partopreni en tiu kultura kaj sinperfektiga laboro.

J.K.

A l ĉ i u j n i d e z i r a s f e l i ĉ a n k a j
p r o s p e r a n N O V A N J A R O N !

Ne forgesu: La 11-an de februaro MASKOBALO!

La 20an de marto JUNULARA KARUSELO !

La 10an de aprilo KONCERTO HONORE AL DRO ZAMENHOF !